Dr. Márkus Gábor:

# PACO KAJ MILITOJ EN EUXROPO POST LA DUA MONDMILITO

ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

2020 Auxgusto en Assisi

# HISTORIO DE HOMA EVOLUO

SURBAZE DE LA LIBROJ:

1. „La Origino de Specioj per Natura Selektado, aŭ konservado de la plej vivkapablaj rasoj en la batalo por vivo" de Charles Darwin (Angla naturalisto, geologo kaj biologo)

2. „Genetiko de Origina Peko: La efiko de Natura Selektado al la Estonto de Homaro" de Christian de Duve (Nobel Premiita Belga biokemisto)

3. „Sapiens: Konciza Historio de Humaro" de Yuval Noah Harari (Izraela historiisto kaj profesoro en la Historia Departamento de Hebrea Universitato de Jerusalem)

# KIO FARIS HOMOJN HOMO?

Laux teorio de Darwin dum miliardoj da jaroj animaloj transformiĝis antropoidoj, kaj dum cent milionoj da jaroj antropoidoj transformiĝis homoj. Tio okazis iom post iom laux natura selektado. En tiu teorio „***la batalo por vivo***” (struggle for life) estas fundamenta koncepto, kiu signifas, ke la plej vivkapablaj rasoj konservigxas en la batalo por vivo, kaj aliaj malaperas.

Kelkaj sciencistoj supozas, ke granda cerbo kaj uzo de iloj faris homojn homo. Aliaj supozasas, ke teamlaboro pligrandigis la homan cerbon. La konkludoj de Profesoro Harari estas aliaj. Li klarigas, ke homoj havis grandan cerbon kaj uzis ilojn por laboro dum du milionoj da jaroj, tamen malgraŭ tio, ili estis nur malfortaj kaj sensignifecaj vivaĵoj inter aliaj animaloj.[1]

---

1 A 60 kg mammal's brain size is 200 cubic cm-s, an earliest man's brain was 600 cm³ 2.5 m.y.a., and modern sapiens's brain is 1200-1400 cm³.

# KIEL OKAZIS HOMA EVOLUO?

Laux Prof. Harari „*Antaŭ sepdek mil jaroj homo sapiens estis sensignifeca besto … en Afriko. Simile kiel simio, meduzo, aŭ insekto. Sed dum la venontaj jarmiloj homoj fariĝis majstroj de la tuta Terglobo kaj teroristoj de la ekosistemo (natura medio). Hodiaŭ ili komencas estiĝi dioj, kiuj klopodas akiri eternan junecon kaj posedi la potencon de kreo kaj detruo.*„[2]

Sciencistoj supozas, ke nur tri mil homoj vivis antaŭ 500 mil jaroj, kaj nun vivas pli ol sep miliardoj.[3] Tio signifas, ke inter milionoj da specioj de vivaĵoj, la homa evoluo estis la plej sukcesa. En la XIX-a jarcento la homaro konkeris la tutan Terglobon. Laŭ  koncepto de Harari „*Homo sapiens konkeris la mondon danke al sia unika lingvo.*"[4] Nur homoj sole inter ĉiuj aliaj animaloj kapablas paroli pri fikcioj (imagiitaj objektoj kaj estaĵoj, kiuj ne videblas, tuŝeblas kaj odoreblas) kaj tiel ili povas efike kaj multnombre kunlabori.

---

2Harari: SAPIENS – A brief history of humankind, on page 465

3http://www.prb.org/Publications/Articles/2002/HowManyPeopleHaveEverLivedonEarth.aspx
4 Harari: Sapiens, page 21.

# LA KONCEPTO DE PROFESORO DE DUVE

La Nobel-premiita Christian de Duve atestas, ke la homaro povis akiri regantan rolon sur la Terglobo per la procedo de natura selektado. Laux lia teorio la senprecedenca homa cerba potenco, agresemo, egoismo, batalemo, sopiro por potenco kaj similaj homaj trajtoj genetike enkoditaj en homan naturon kaj la granda adaptabileco ebligis, ke homaj socioj sukcese okupis ĉiujn teritoriojn de ĉiuj kvin kontinentoj.

Sed la prezo por tiu sukceso estis tre alta. Diversaj homaj triboj, sociaj grupoj, landoj kaj grupoj de landoj bataladis en teruraj militoj, kie centmilionoj da homoj estis mortigitaj. Tiel oni konstruis grandegajn mondimperiojn. Krome, la homaro detruis la vivkondiĉojn sur la Terglobo per diversaj manieroj. Ili detruis la naturan medion kaj kaŭzis, ke la planedo estiĝu danĝera loko per kumulado de pli ol dek mil nukleaj bomboj. Tiel en la dudeka jarcentro estiĝis risko, ke la Terglobo fariĝos neloĝebla.

# LA PLEJ GRANDAJ MONDIMPERIOJ

Dum la lastaj du mil jaroj la homaro havis terurajn militojn por okupi vastajn teritoriojn por konstrui grandajn mondimperiojn. La plej grandaj estis la venontaj[5]

| Imperio | Teritorio (milionoj da kv.km) | % de monda landa teritorio | Jaro |
|---|---|---|---|
| Brita Imperio | 35.5 | 23.84 | 1920 |
| Mongola Imperio | 24.0 | 16.11 | 1270 |
| Rusa Imperio | 22.8 | 15.31 | 1895 |
| Hispana Imperio | 13.7 – 20.0 | 13.43 | 1810 |
| Qing Dinastio | 13.1 – 14.7 | 9.87 | 1790 |
| Dua Franca Kolonia Imperio | 11.5 | 7.72 | 1920 |
| Abbasid Kaliflando | 11.1 | 7.45 | 750 |
| Umayyad Kaliflando | 11.1 | 7.45 | 720 |
| Yuan Dinastio | 11.0 – 13.72 | 9.21 | 1310, 1330 |
| Xiongnu Imperio | 9.0 | 6.04 | 176 ante Kristo |
| Brazila (Portugala) Imperio | 8.3 | 5.6 | 1889 |
| Japana Imperio | 8.5 | 3.3 | 1938, 1942 |

5 https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_largest_empires

# LA DUA MONDMILITO

En la monda historio la dua mondmilito estis la plej granda laux la venontaj punktoj

- estis la plej sanga milito, la nombro de viktimoj estis inter 40 kaj 50 milionoj[6]
- havis la plej grandan mondpolitikan efikon (Sovetio ricevis rajton kontroli Orientan Euxropon, Cxinio estigxis komunista lando, la mondpotenca centro translokigxis el Okcidenta Euxropo al Usono kaj Sovetio)
- batalado okazis en la plej granda teritorio sur la Terglobo: en Euxropo, la Pacifiko, Suda kaj Orienta Azio, Mediteraneo, Afriko kaj Sudokcidenta Azio
- oni uzis nukleajn armilojn por la unua fojo en la homa historio, per kiu oni povos detrui la vivkondicxojn sur la tuta Terglobo en la estonto.

Rilate al Tio Einstein diris: „*Mi ne scias, kiujn armilojn oni uzos dum la tria mondmilito, sed mi scias, ke en la kvara mondmilito oni uzos bastonojn kaj sxtonetojn.*"

6 https://www.britannica.comevent/World-War-II

# MILITOJ KAJ SERIOZAJ KONFLIKTOJ EN EUXROPO POST LA DUA MONDMILITO – 1.

Post la fino de la dua mondmilito multaj homoj supozis, ke poste estigxos longtempa paca tempo en Euxropo, sed tio ne okazis. Anstataux tio estigxis multegaj konfliktoj, militoj, revolucioj, civilaj militoj kaj bataladoj, kies listo estas la venonta:

- 1944–1956 Gerilla milito en la Baltikaj landoj
- 1945–1949 Greka civila milito
- 1947–1962 Romania antikomunista rezista movado
- 1953 Ribelo en Orienta Germanio
- 1956 Ribelo en Poznań
- 1956 Hungara Revolucio
- 1956–1962 Operacio Harvest
- 1958 Opéracio Corse
- 1958 Unua morua milito (First Cod War)
- 1959–2011 Baska konflikto

# MILITOJ KAJ SERIOZAJ KONFLIKTOJ EN EUXROPO POST LA DUA MONDMILITO – 2.

- 1961–1967 Sud-Tirola ribelado
- 1966-1969 Nord-Irlanda civilrajta protesto kaj reapero de IRA
- 1967 Greka pucxo
- 1968 Warsaw Pakta invado en Cxekoslovakio
- 1968–1998 Nord-Irlanda konflikto (The Troubles)
- 1970–1984 Mizero en Italio
- 1972 Bugojno grupo
- 1972–1973 Dua morua milito
- 1974 Turka invado en Cipro
- 1974 Carnation Revolucio
- 1975–1976 Tria morua milito
- 1975 Portugala pucxa provo
- 1976–gxis nun Korzika ribelado
- 1981 Hispana pucxa provo
- 1988–1994 Nagorno-Karabakh milito

# MILITOJ KAJ SERIOZAJ KONFLIKTOJ EN EUXROPO POST LA DUA MONDMILITO – 3.

- 1989 Romania revolucio
- 1990–1991 Soveta atako al laLitvania landlima posteno
- 1991 Januaraj eventoj (January Events)
- 1991 La barikadoj (The Barricades)
- 1991–2001 Jugoslava milito
- 1991 Dek taga milito en Slovenio
- 1991–1995 Kroata milito por sendependigxo
- 1992–1995 Bosnia milito
- 1998–1999 Milito en Kosovo
- 1999–2001 Ribelado en la Preševo Valo
- 2001 Ribelado en Macedonio
- 1991–1992 Georgia milito kontraux la Rusa-Osetia alianco
- 1991–1993 Georgia civila milito
- 1992 Transnistria milito
- 1992 Orient-Prigorodna konflikto

# MILITOJ KAJ SERIOZAJ KONFLIKTOJ EN EUXROPO POST LA DUA MONDMILITO – 4.

- 1992–1993 Milito en Abkhazio
- 1993 Cherbourga incidento
- 1993 Rusia konstitucia krizo
- 1994–1996 Unua cxecxena milito
- 1995–1996 Imia/Kardak milita krizo
- 1997–1998 Misila krizo en Cipro
- 1997 Albania civila milito en 1997
- 1997–present Disidenta Irlanda Republika kampanjo
- 1998 Ses taga milito en Abkhazio
- 1999 Milito en Dagestan
- 1999–2009 Dua cxecxena milito
- 2001 Georgia, Kodori krizo
- 2001 Ribelado en la Macedonia Respubliko
- 2004–2013 Mizero en Kosovo
- 2004 Mizero en Kosovo

# MILITOJ KAJ SERIOZAJ KONFLIKTOJ EN EUXROPO POST LA DUA MONDMILITO – 5.

- 2008 Mizero en Kosovo
- 2011–2013 Nord-Kosova krizo
- 2004 Georgio, Adjara krizo
- 2004 Georgia, Sud-Osetia bataletoj
- 2006 Georgia, Kodori krizo
- 2007–2015 Civila milito en Ingushetio
- 2008 Mardakert bataletoj
- 2008 Rusia–Georgia milito
- 2009–present Ribelado en la Nord-Kauxkazo
- 2013–2014 Euromaidan kaj por-Rusia mizero en Ukrainio
- 2014 Krima krizo
- 2014–gxis nun Milito en Donbass
- 2015 Kumanovo konfliktoj
- 2016 Nagorno-Karabakh konfliktoj
- 2018 Gyunnyut konfliktoj

# TRAJTOJ DE LA EUXROPAJ MILITOJ KAJ KONFLIKTOJ

- Kelkaj militoj estis tre sangaj kaj viktimigxis multaj homoj. ekz. 140,000 en la jugoslaviaj militoj
- Kelkaj konfliktoj estas tre longdauxraj, ekzemple la cxecxena-rusa konflikto dauxrigxas dum 235 jaroj, la disidenta irlanda respublika kampanjo dum 21 jaroj, ambaux la georgia-osetia kaj la abkhaza-georgia konfliktoj dum 31 jaroj.
- Krom la menciitaj konfliktoj amase abundas ankaux alitipaj konfliktoj. Ekzemple ciganoj sentas, ke ili suferas pro diskriminado en multaj landoj. Katalunoj havas fortan movadon por sendependigxo de Hispanio. Hungaraj minoritatoj klopodas akiri auxtonomion en kelkaj orient-europaj landoj. Enmigrantoj, cxefe islamanoj klopodas akiri pli da rajtoj en Okcidenta Euxropo.
- Krom la varmaj, sangaj konfliktoj estas ankaux multaj seriozaj malvarmaj konfliktoj. Ekzemple la unua malvarma milito dum 1946-1991 okazis inter Sovetio kun siaj alianclandoj kaj Usono kun siaj alianclandoj. Multaj sciencistoj kaj politikistoj opinias, ke post la unua malvarma milito aperis aliaj konfliktoj kaj kontrauxstaroj, por kio oni uzas la vorton „dua malvarma milito”.
- Estas ankaux militsimila fenomeno inter milionoj da azilpetantoj en Turklando kaj Okcidenta Euxropo. Malgraux la fakto ke Germanio deklaris politikon de „Willkommenskultur” kaj kuragxigis amasan enmigradon, tamen oni ne emas akcepti ilin. Anstataux, la EU pagas milirdojn da euxroj al Turkio, petante ke la turka armeo malhelpu ilin eniri la Euxropan Union.

# LA „CENTRO-PERIFERIO" KONFLIKTO

Dum la komunista epoko la okcident-euxropa propagando kuragxigis orient-euxropanojn, ke ili detruu la orientan blokon kaj aligxu al la „Libera Mondo" (do, al la kapitalisma mondo) por altigi la vivnivelon. Fakte tio okazis nur parte, sed estigxis multaj gravaj problemoj. Ekz. en Hungario

- dum la komunista epoko 12 sukerfabrikoj funkciis en Hungario (unu el la „Periferiaj landoj"), kaj post la politikaj sxangxoj okcident-euxropaj sukerentreprenoj (entreprenoj en la „Centro") akiris kontrolon de cxiuj tiuj sukerfabrikoj. Poste ili fermis 11 fabrikojn, do nun funkcias nur unu sukerfabriko en Hungario.
- Dum la komunista epoko hungaraj farmeroj produktis betojn en 131 mil hektara teritorio, sed poste ili povis fari gxin (en 2008) nur en 10 mil hektara. Sekve de tio multaj farmeroj kaj laboristoj kaj oficistoj en la sukerfabrikoj perdis laboron.
- Dum la komunista epoko Hungario produktis 600 mil tunojn da sukero jare kaj eksportis 300 mil tunojn. En 2003 oni produktis nur 252 tunojn, do la lando devis importi sukeron.
- La olea industrio simile detruigxis post la politikaj sxangxoj.
- Pro forta subteno de Okcident-europaj auxtoritatoj la Hungara registaro donis koncesion por franca entrepreno por funkciigi auxtovojon, sed en sekreta kontrakto la entrepreno postulis, ke la Hungara registaro pagu cxiam 8%-an profiton, ecx se la entrepreno produktas malprofiton. Cxar la logxantaro ne toleris tion, la hungara cxefministro cxesigis la kontrakton, kaj pagis profiton por la entrepreno por 10 aux 20 postaj jaroj. Post kelkaj tagoj tiu cxefministro ricevis „legion de honoro" de la franca sxtatprezidanto.

# MILITSIMILA KOMUNIKADO INTER LA CENTRO KAJ PERIFERIO

Kiam oni rigardas televidajn programojn, oni povas sperti, ke Okcident-Europaj landoj kaj oficistoj de la Euxropa Unio acxe kaj en milita stilo kritikas la periferiajn landojn (ekzemple Hungarion kaj Pollandon), kaj kuragxigas la logxantaron sxangxi la oficiale elektitajn registarojn, se ili efike reprezentas siajn naciajn interesojn. Ekzemple ili diras, ke estas diktaturo en Hungario, cxar

- la hungara registaro reduktis la agadterenon de sia nacia Konstitucia Kortumo. Sed estas malpermesite kritiki aliajn okcident-euxropajn landojn, kie ecx Konstitucia Kortumo ne funkcias.
- ambaux socialistaj kaj politike dekstraj hungaraj cxefministroj toleras, helpas, aux akceptas, ke siaj familianoj ricxigxas, sed estas malpermesite kritiki ekzemple la anglan regxinon, kiu kutime donacas valorajn palacojn al siaj familianoj, kiam ili geedzigxas.
- la hungara cxefministro foje-foje maldungas ambasadorojn kaj altrangajn sxtatoficistojn, sed estas malpermesite kritiki ekzemple la usonan sxtatprezidanton kaj la usonan politikan sistemon, kie preskaux cxiuj ambasadoroj maldungigxas, kiam nova sxtatprezidanto elektigxas.
- en Hungario la Parlamento ne efike kontrolas la registaron. Malgraux la fakto ke la hungara parlamenta kontroloficejo (Sxtata Auxditora Oficejo) estas tute sendependa de la registaro, kaj en multaj aliaj landoj (ekzemple en Svedio) tute ne estas sendependaj kontrol-organizajxoj.
- la hungara nacia bugxeto havas 70-80%-an sxuldon, sed toleras, ke la sxuldo en Greklando estas 182% kaj en Italio estas 135%

Ecx pli grava afero estas, ke usonaj fondajxoj kaj EU oficejoj financas hungarajn sociajn grupojn por ke ili agadu kontraux sia registaro, kaj provu malaperigi la oficiale elektitan registaron.

# SENDEPENDIGXOJ EN EUXROPO

Post la dua mondmilito estis gxenerala tendenco en Euxropo, ke popoloj emis sendependigxi. Tiel

- estigxis Cxekio kaj Slovakio el iama Cxekoslovakio
- estigxis Slovenio, Kroatio, Serbio, Montenegro, Kosovo, Nord-Macedonio kaj Bosnio-Hercegovino el iama Jugoslavio
- estigxis Estonio, Litovio, Latvio, Ukrainio, Rusio kaj multaj aliaj landoj de iama Sovetio.

Kiel ni vidis, ofte okazis sangaj varmaj militoj en Euxropo, sed krom tio preskaux cxiam estis ankaux malvarmaj, komercaj, financaj, ideologiaj kaj kulturaj militoj kaj ankaux etnaj kaj religiaj konfliktoj. Por ke Britio pli efike povu reprezenti siajn naciajn interesojn, tiu lando forlasas la Euxropan Union dum cxi-tiu jaro. La celo de tiu sxangxo estis

- konstrui siajn sendependajn komercajn rilatojn sen EU kontrolo,
- konstrui kaj funkciigi sian propran enmigradan politikon sen EU ordonoj (laux la auxstralia modelo) laux siaj naciaj interesoj
- funkciigi sian propran kortuman sistemon sen submetado de Euxropaj kortumoj

# LA ORIGINA PEKO

La Biblio havas rakonton pri la origina peko. Laux tiu rakonto Dio malpermesis al la unuaj homoj: Adam kaj Eva mangxi frukton de pomarbo, kiu estis simbolo de malpermesata kaj dangxera scio. Sed ili ne obeis, kaj tiamaniere estigxis la origina peko de homaro. La Nobel-premiita Christian de Duve atestas, ke la origina peko okazis, sed tio ne estis, ke Adam kaj Eva mangxis la malpermesitan pomon.

Laux la koncepto de Christian de Duve la origina peko devenas de la agresemo, egoismo, batalemo, sopiro por potenco kaj similaj negativaj homaj trajtoj, kiuj estas genetike enkoditaj en la homan naturon. Sekve de tio la homaro cxiam en sia historio bataladis kaj militis kontraux aliuloj kaj aliaj grupoj kaj pro tio ili povis rapide multnombrigxi kaj okupi ĉiujn teritoriojn de ĉiuj kvin kontinentoj. En tiu koncepto estas kompreneble, ke la homa historio estas historio de militoj kaj bataladoj.

# KONKLUDO

**Multaj homoj opinias, ke la gxenerala tendenco en homa historio estas, ke la homaro vivas harmonie en paco. Kaj militoj estas nur eventualaj kaj maloftaj aferoj.**

**Sed rigardante la historiajn eventojn, kaj la amason de militoj, krizoj, konfliktoj, bataladoj kaj ribeloj, kiuj okazis en Euxropo post la dua mondmilito, mi havas alian konkludon. Mi opinias, ke la gxenerala tendenco estas, ke okazas militoj, krizoj, konfliktoj, bataladoj kaj ribeloj inter diversaj homoj kaj diversaj homaj grupoj. Kaj pacaj kunvivadoj estas nur eventualaj kaj maloftaj tempoj en la homa historio.**

**Pro tio mi konkludas, ke la celo de Assisi Sankta Francxesko krei pacajn interhomajn rilatojn gxis nun ne realigxis, kaj ne estas sxanco, ke gxi realigxos en la antauxvidebla proksima estonto.**